

## & Magdalena balado:

< Ripete 27 sed rekante 20 el 41 batoj por strofo, entute 615 paŝoj dum 7 minutoj.  
Norda Kantaro #4422. Mezepoka kristana legenda kanto pri pentema pekulino el la domo de Simon. El sveda tradukis Martin Strid (2016).>

### (#Melodio:

<1,7:41> (

/dodo TiTi LaLa dodo redo mi i; so mimi fa re mi i; do domi sodo dodo redo Ti Ti; So domi so dodo Ti La a; so mifa sodo dodo redo Ti Ti; So domi so dodo Ti La a;

)×15 )+

### (&Strofoj:

'1 Magdalena iris en arbara frond'.

(×; **Brilis hodiaŭ sun'**)

(; Tie savanton sian ŝi renkontis.

(×; **En arbareto la verda**))×

'2 Magdalena falas antaŭ sia savant'.

..... "Trinku amikecon el mia blanka man'." .....

'3 "Mi ne povas trinki ĝin el via man'  
..... ĉar kun multaliaj estis vi kompan'.  
.....

'4 Unun vi infanon havis kun via patr'.  
..... Ĝin ĵetis vi en la granda mar'. .....

'5 Duan vi infanon havis kun via frat'.  
..... Ĝin ĵetis vi sub la granda pont'. .....

'6 Trian vi infanon havis kun la pastro.  
..... Tiam vi pekis en pleja drasto. ....

'7 Vi pardonon alie ne povas akiri .....  
ol en arbaro sep jarojn iri. ....

'8 Vi ne liton havu en alia lok' ..... ol  
kuŝi sur alta monta rok'. .....

'9 Vi nenion havu alian por manĝ' .....  
ol maĉi ŝelon de pina arb'. .....

'10 Nenion alian trinki havu vi ..... ol  
suĉi sukcon de tilifoli'. .....

'11 Magdalena iris en arbara frond'. .....  
Tie savanton sian ŝi renkontis. ....

'12 "Magdalena, liton kiel ŝatis vi?" .....  
"Kiel molanaslanugo estis ĝi." .....

'13 "Magdalena, kion pensis vi pri  
manĝ'?" ..... "Manĝo mia estis kiel reĝa  
plad'." .....

'14 "Magdalena, kion pensis vi pri  
trink'?" ..... "Trink' mia estis kiel ruĝa  
vin'." .....

'15 "Magdalena, jen finiĝas via pun'.  
..... En la ĉielon vi paŝu nun." .....